

LANDO DE ILEI-KONFERENCO ATENDAS VIN!

La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino)

29 de julio - 5 de aŭgusto 2008

Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero

Se Vi faras ekzamenon de elementa nivelo dum UK, ni havas al Vi ankoraŭ unu proponon: tuj post ĝi venu al ILEI-konferenco por fari la meznivelan ekzamenon kaj ĝuu interŝanĝon de spertoj kun afrikaj samideanoj.

Se Vi ne kuraĝas fari elementan ekzamenon dum UK — venu por fari ĝin dum ILEI-konferenco. Kial? Ĉar apude, dum la tuta semajno, Vi havos diverslandajn instruistojn kaj instruantojn al kiuj ĉiam eblas drikkti Viajn demandojn, ĉiam kun ili Vi povos konsultiĝi pri diversaj gramatikeroj kaj lingvouzo. Eĉ lerni tion, kion Vi ne sukcesis imagi kaj multe plibonigi sian lingvonivelon por nepre sukcesi dum la ekzameno.

Oni atentigas pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj „atingu almenaŭ la nivelon de meza ekzameno“. Simile, laŭ la regularo pri nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, „kandidatoj devas posedi Eseranton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA“.

Estraro de ILEI aparte atentigas ĉiujn instruistojn, instruantojn kaj instruontojn, ankaŭ membrojn de ILEI, ke ili atingu almenaŭ ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA.

POR LOĜANTOJ DE B-LANDOJ LAŬ LA 36a PAĜO DE UEA JARLIBRO EN LA ĈIJARA KONFERENCO EKZAMENIĜO SENPAGA!

Dum la konferenco en Portonovo okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj.

La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika antaŭtesto, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika antaŭtesto rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj anticipa sinanonco estas konsilinda. Anonsu Vin



prefere antaŭ la 15a de julio 2008 ĉe la prezidento de ekzamena komisiono dum la konferenco en Parma [Mireille Grosjen](mailto:Mireille.Grosjen@rpn.ch) Mireille.Grosjen@rpn.ch ĉefa loka organizanto [Charles Alofa](mailto:Charles Alofa alofkarlo@yahoo.fr) alofkarlo@yahoo.fr aŭ estrarno pri konferencoj [Aida Ĉiĝikaite](mailto:Aida Ĉiĝikaite aidute@mail.lt) aidute@mail.lt kaj samtempe pagu la ekzamenkotizon (60 % de la

MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA konto **ilek-a**. Kaze de neprezentiĝo aŭ ne sukceso en la antaŭtesto, oni ricevos 50 % de la pagita kotizo. Eblos sin anonci ankaŭ dum registrado veninte al la konferenco. Tiam la ekzamenkotizo estos 70 % de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Detalaj informoj pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, troviĝas ankaŭ ĉe www.edukado.net/ekzilei.jsp

NE PERDU EBLECON KONVINKIĜI KIOM BONE VI UZAS LA LINGVON!

Afriko de proksime —

ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!

BONVENON!

Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike — ni ege petas Vin *subteni* la konferencon per financa helpo kaj subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko per enpagoj al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“. Sed pli bone plenigi **aliĝilon** en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php> kaj partopreni en la unua en historio granda internacia porinstruista E-aranĝo en Afriko. **Informoj** pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en <http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php>.

Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al:

Aida Ĉiĝikaite aidute@mail.lt (ILEI-estrarno pri konferencoj) kaj

Charles Alofa alofkarlo@yahoo.fr (prezidanto de LKK).